



Universala Esperanto-Asocio. Jen serio de gvidiloj pri plej diversaj funkcioj kaj aspektoj de la asocia vivo.

Ĉi tiu Gvidilo arigas regularajn difinojn pri la posteno de Ĉefdelegito, kune kun praktikaj konsiloj.

En la sekvo, la vorto 'delegito' inkluzivas la kategoriojn ĈD, D, VD, JD kaj FD, krom se aperas kontraŭa indiko (ekzemple, nur 'D').

## La Statuto de UEA

Ĝi estas trovebla ĉe: <https://uea.org/teko/regularoj/statuto>

Jen la sekcio de la Statuto de UEA, kiu rilatas al la rolo de Ĉefdelegitoj

### E. Ĉefdelegitoj, perantoj kaj delegitoj

#### 19. Ĉefdelegitoj kaj perantoj.

Por reprezenti la Asocion en iu lando aŭ teritorio, la Estraro nomumas ĉefdelegiton, konsulte kun la respektiva aliĝinta landa asocio, se ekzistas tia. La Estraro povas nomumi ankaŭ unu aŭ pliajn perantojn.

#### 20. Delegitoj.

La delegita reto konsistas el delegitoj, vicdelegitoj, fak-delegitoj, junularaj delegitoj, kaj eventuale aliaj kategorioj.

#### 21. Reguloj.

La elektoprocedon, funkciojn kaj kondiĉojn fiksas aparta regularo pri delegiteco kaj peranteco.

## La Regularo pri Delegitoj

Ĝi estas trovebla ĉe: [https://uea.org/teko/regularoj/regularo\\_delegitoj](https://uea.org/teko/regularoj/regularo_delegitoj)

Specifaj mencioj pri la Ĉefdelegitoj (ĈD) aperas en alineoj 3, 5, 6, 7, 8 kaj 12

Interalie, ĝi klarigas la devojn kaj rajtojn de la Ĉefdelegitoj kompare al tiuj de la Ĝenerala Direktoro. Koncize: la ĈD proponas Delegitojn (D) kaj Vicdelegitojn (VD) kaj Regionajn Delegitojn (kiuj praktike ne ekzistas ĝis nun). Pri Fakaj Delegitoj (FD) decidas la Ĝenerala Direktoro, konsulte kun la ĈD.

La 12a punkto starigas al Ĉefdelegitoj klaran devon:

Ĉefdelegito ĉiujare enketas pri la agado de la delegitoj en sia lando kaj skribe raportas al la Direktoro de la Centra Oficejo.

## Konsilaro por delegitoj

Vi povos konsili al viaj delegitoj per la sekva teksto en la retejo de UEA:

[https://uea.org/teko/konsilaro\\_delegitoj](https://uea.org/teko/konsilaro_delegitoj)

Teksto pri la reguloj por la uzado de la Delegita Reto troveblas en la presita Jarlibro, tuj antaŭ la Reto mem (JL 2017, p. 109)

## Ĉefaj kondiĉoj

1. Kandidato por nova delegiteco devas esti Individua Membro de la Asocio jam unu jaron antaŭ la akcepto. (laŭ punkto 5.1 de la Regularo pri Delegitoj)
2. Delegito, kiu ĉesas dum sia oficperiodo esti Individua Membro estas konsiderata kiel demisiinta (laŭ punkto 7.1 de la Regularo pri Delegitoj)

## Praktika gvidado

1. Plenumi la ĉiujaran devon sendi raporton al la Ĝenerala Direktoro (ĜD) kaj prefere ankaŭ al la estrarano respondeca pri Landa Agado. Lige kun tio la Ĉefdelegito kontaktu ĉiujare la delegitojn en sia lando por informiĝi pri ilia agado, ĉu kiel delegito ĉu pli ĝenerale en la movado.
2. Raporti al la ĜD kaj la respondeca estrarano bontempe pri forpasintaj delegitoj. Landaj Asocioj havas la taskon raporti pri forpasintaj membroj, kiuj ne estas delegitoj. Rilata tasko estas proponi nekrologan tekston al la revuo *Esperanto* kaj la supre nomitaj personoj. Aparta gvidilo donos konsilojn por la pretigo de tiaj nekrologaj tekstoj.
3. Rimarki delegitojn, kiuj ne plu povas plenumi la oficon de delegito, pro ŝanĝitaj cirkonstancoj, la sanstato aŭ granda aĝo.
4. Prizorgi la varbadon de novaj delegitoj, emfaze pri junaj delegitoj (JD), pri kapablaj fakuloj (FD), kun atento al plia ekvilibro inter la viroj kaj virinoj en la reto.
5. Proponi novan Delegiton (D) aŭ vic-delegiton (VD) en la plej gravaj urboj de la lando, precipe okaze de vakiĝo de tiuj oficoj.
6. Sekvi la aktivecon de urbaj aŭ regionaj grupoj, por laŭeble proponi delegitojn (ajnspecajn) en urboj bone distribuitaj tra la lando aŭ de aparta allogo.
7. Minime unufoje jare testu, ke ĉiun retadreson de la delegitaro; kaze de resalto aŭ nerespando, sekvu la aferon por akiri kaj anonci al UEA validan retadreson aŭ akiri vivsignon.

## Kiel aliri la delegitan reton elektronike

Iru al: <https://uea.org/reto>. Atentu, tiu parto de la retejo ne estas alirebla por nemembroj, kaj ne trovebla el la ĉefaj indeksoj. La sola eblo trovi iun ene de la reto estas uzi la serĉfunkcion.

## Kiel unuopuloj anoncu peton iĝi nova delegito

1. Iru al <https://uea.org/reto/respondilo> kaj ensalutu.
2. La retejo servas por unuopulo, kiu volas anonci sin vicdelegito aŭ fakdelegito

3. La retejo krome servas por anonci ŝanĝojn al ekzistantaj datumoj, aŭ doni klarigojn.

La submeto de la peto dependas de la akcepto de la Regularo pri Delegitoj.

Eksterreta petilo en formato PDF estas petebla. Alia vojo estas sendi retmesaĝon kun ĉiu informo al <jarlibro@co.uea.org>

## Kiel ĉefdelegitoj anoncu peton por nova D delegito?

Por nun, la ĈD sendu retmesaĝon al [jarlibro@co.uea.org](mailto:jarlibro@co.uea.org), kun ĉiuj bezonataj informoj.

=====

### Analizo SMG:

UEA devas restrukturi la vojon al petado de delegiteco:

- 1) Formularo reta por ĈD, kiu proponu kaj subtenu D aŭ VD ene de la koncerna teritorio.
- 2) Formularo reta por FD aŭ JD, kiun decidu la ĜD, konsulte kun la ĈD (pri FD) kaj TEJO (pri JD).
- 3) Klarigo kial estis starigita la kategorio 'Regiona Delegito' kaj ĉu ĝi iam ajn estos uzinda.
- 4) Ĉiu petilo estu strukturita simile por aŭtomatigi kiom eble la enskribon de la delegito; ja la kandidatoj devas jam esti membroj, do la plimulto de la bezonataj informoj devas ekzisti ĉe UEA: ni ne postulu malnecesajn ripetojn.

La akceptado de delegiteco devas inkluzivi promeson de akceptitaj delegitoj anonci al UEA novajn retadresojn.

SMG feb 6, 2018.

V2 SMG feb 13, 2018

Lingva kontrolo RM traktita SMG jan 15, 2018

Vortoj: 840